# Hispana Esperanto GAZETO

*Eis aqui se descobre a nobre Hespanha*
*Como cabeça alli da Europa toda.*

*De ĉi tie jen nobla Hispanujo*
*Kvazaŭ kapo de la tuta Eŭropo.*
(«Os Lusiadas». Kanto III[a], XVII.)

CAMOENS

**5a jaro Oktobro 1935 N-ro 52**

OFICIALA ORGANO DE
HISPANA ESPERANTO ASOCIO
ORGANO OFICIAL DE LA
ASOCIACIÓN ESPERANTISTA ESPAÑOLA

*Redakcio kaj Administracio:*
APARTADO DE CORREOS 1.089
MADRID (HISPANUJO)

## MEMORINDAJ TAGOJ

1. 1889.—*Apero de la unua gazeto en Esperanto* «*La Esperantisto*» *en Nürnberg* (*Germanujo*).

12. 1492.—*Eltrovo de Ameriko.*

21. 1520.—*Eltrovo de la markolo de Magallanes.*

27. 1553.—*La Inkvizicio bruligas en Ĝenevo la hispanan kuraciston Miĥaelo Servet, eltrovinto de la pulma cirkulado de la sango.*

# ACTA LXIII DE LA JUNTA CENTRAL EJECUTIVA DE H. E. A.

En Madrid, a las 20 horas del día 9 de septiembre de 1935, se reunió en el domicilio social la Junta Central Ejecutiva, con asistencia de los miembros que se expresa al margen.

El vocal regional de Castilla la Nueva, D. José Artigas, lee un razonado escrito del samideano D. Julio Mangada, en el que propone:

I. Que para reducir los gastos de Secretaría se abra en la Revista una sección titulada *Respuestas,* y únicamente en ella se conteste la correspondencia recibida, salvo la que venga acompañada de franqueo para la contestación y la que se refiera a asuntos de vocales regionales y de Comités organizadores de Congresos.

Se acuerda abrir la citada sección, aunque sin limitar la contestación por correo a los casos que se citan en la propuesta.

II. Que se destinen 1.000 pesetas para premios a las diez escuelas extranjeras que presenten mejor conjunto de trabajos escolares y en las que se enseñe esperanto, completando estos diez premios con la colección completa de nuestras obras esperantistas que posea la Asociación, disponiendo para ello también las cedidas condicionalmente por el que propone, colección de libros con que será compensada también toda escuela concursante, a fin de estimular a los profesores, que siempre resultarán compensados aunque no alcancen premio.

Que este concurso se delegue en la Sección de Maestros esperantistas de la Asociación para su organización, distribución de la cantidad en premios y cuanto con el concurso se refiera, bien entnedido que el número de naciones sea limitado al Japón, Suecia, Noruega, Finlandia, Estonia, Letonia, Lituania, Polonia, Checoeslovaquia y Dinamarca; y que se suplique a los miembros de H. E. A., y especialmente a los maestros, contribuyan con cuotas de auxilio voluntarias, desde la más modesta hasta donde se quiera en cuantía, para que los fondos sociales puedan resarcirse en todo o en parte de las 1.000 pesetas asignadas para premios.

Se acordó que el asunto pase a estudio de la Asociación Esperantista de Maestros, quienes propondrán la cantidad que se ha de destinar a esta atención, y que se circunscriba el concurso (por ahora oslamente) a los países que se citan, por ser menos conocidos, y en otros concursos se atenderá a otras series de países.

III. Que para llevar inmediatamente a la práctica el acuerdo citado, se proceda a la impresión de «¿Qué es el Esperanto?» arre-

glado al formato 17 $^1/_2$ × 12 $^1/_2$ centímetros, por más económico y práctico sin dejar de ser manuable, y como dejará de ser un folleto para convertirse en un libro de cerca de 200 páginas, se proceda también a anunciar que se facilitará al precio de seis reales ejemplar a los miembros de H. E. A. que envíen esa suma, con la cuota para 1936, antes del 15 de diciembre próximo, pues a partir de esta fecha el precio será mucho más alto.

Se acordó, en vista de lo avanzado de la hora y tener que tratarse todavía de una propuesta para celebrar en Barcelona un Congreso, volver a reunirse la Junta el lunes 16 para tratar de este asunto.

Se leyó la mencionada propuesta de Barcelona para que se celebre en la próxima primavera en dicha ciudad el XI Congreso Nacional de Esperanto. Se acordó que los delegados regionales de Cataluña D. Francisco Gorgues y D. José Anglada, de acuerdo con el Instituto Zamenhof, organicen el Congreso, al cual se le concede, como subvención, doscientas pesetas. Que la cuota de congresista sea de cinco pesetas para los samideanos y de diez para las Asociaciones; y que el presidente y el secretario, en vista del material de propaganda disponible que haya, envíen a la Comisión organizadora ejemplares del *BES-adresaro* 1935, de *Mia poezio* y de *La kreitaj profitoj*, como premio a los *frupagontoj*.

Todos los acuerdos se tomaron por unanimidad.

El secretario dió cuenta de que, como resultado de una instancia, se ha autorizado, con fecha 31 de agosto, que en los sobres y fajas de periódicos se estampen sellos y leyendas de propaganda esperantista.

El secretario, *Fernando Redondo*.—V.° B.°: El presidente, *Sidonio Pintado*.

Asistieron: el presidente; D. Luis R. Escartín, vicepresidente; D. Benito Anguiano, tesorero; D. José Artigas, D. Carlos de San Antonio, D. Javier Marauri y D. Domingo Díaz Ambrona, vocales; D. Jacinto Martín, vecesecretario, y el secretario.

---

## ACTA LXIV DE LA JUNTA CENTRAL EJECUTIVA DE H. E. A.

En Madrid, a las 20 horas del día 16 de septiembre de 1935, se reunió en el domicilio social la Junta Central Ejecutiva, con asistencia de los miembros que se expresa al margen.

Se aprobaron por unanimidad las actas números LIX, LX, LXI, LXII y LXIII.

Se acordó por unanimidad:

1.° Comprar doce ejemplares de la *Plena Gramatiko* para facilitarlos a los samideanos a precio económico.

2.° Tomar en consideración la tercera propuesta de D. Julio Mangada; pero en vista de que no ha asistido el Sr. Artigas (que podía facilitar varios datos que deseaban conocer algunos de los reunidos), aplazar hasta la próxima reunión el tomar un acuerdo definitivo.

3.° Nombrar una Comisión que esté en comunicación constante con los señores Gorgues y Anglada para cuanto se refiera a la propaganda y organización del Congreso. Por mayoría fueron designados D. Luis R. Escartín, D. Fernando Redondo y D. Jacinto Martín.

No habiendo más asuntos pendientes se levantó la sesión.

El secretario, *Fernando Redondo*.—V.° B.°: El presidente, *Sidonio Pintado*.

Asistieron: el presidente; D. Benito Anguiano, tesorero; don Fernando Molina, vicetesorero; D. Javier Marauri, vocal; D. Jacinto Martín, vicesecretario, y el secretario.

## INSTITUTO ESPAÑOL DE ESPERANTO

**Preseraro.**—En la lista de diplomas expedidos publicada en el número de julio, figura, por error, el núm. 239 D. Ricardo *Avilés*; su nombre exacto es D. Ricardo *Quiles* Pellicer.

**Nuevos institutanoj.**—Transcurrido con exceso el plazo señalado el 1.° de julio sin que se haya recibido ningún voto en contra, quedan nombrados institutanoj D. Julián Sosa (Madrid); don Salvador Oliván, D. Manuel Monteagudo (Coruña); D. Hipólito S. Luengo, D. Javier Marauri (Madrid), y D. Luis Santamarina.

Madrid, 2 de septiembre de 1935.—El secretario, *Fernando Redondo*.

## OPINIOJ PRI LOPE DE VEGA

Se iam estis poeto, al kiu lia lando ŝuldis ne nur unu dramon, sed tutan literaturon, tiu estis Lope de Vega. (*Schank*.)

Lope de Vega estis monstro de la Naturo. (*Cervantes*, aludante lian laborkapablon.)

Li estis plej riĉa kaj samtempe, plej malriĉa poeto de sia epoko, ĉar nenia almozulo petis al li almozon nesukcese. (*Montalbán*.)

## ASOCIACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Relación numérica de las profesiones y oficios que tienen sus asociados:

**A**bogados, 3; agente de seguros, 1; ajustadores, 2; albañiles, 3; arquitecto, 1; ayudante de Catastro, 1.—**B**arberos, 4; batanero, 1.—**C**ajero de una Caja de Ahorros, 1; calderero, 1; camarero, 1; capitán de la Marina mercante, 1; carpinteros, 7; carroceros, 2; cerrajero, 1; cincelador-repujador, 1; comerciantes, agentes y viajantes, 32; confiteros, 4.—**Ch**apista, 1.—**D**elineantes y dibujantes, 6; dentista, 1; dorador, 1.—**E**banistas, 2; electricistas, 3; empleados, 15; empleados de Banca, 3; encuadernador, 1; escribientes y oficinistas, 14; escultor, 1; estudiantes, 27.—**F**armacéuticos, 4; ferroviarios, 170; forjador, 1; fotógrafos, 2; fundidores, 2.—**G**rabadores, 4; guardias municipales, 3.—**H**errero, 1.—**I**mpresor, 1; ingenieros, 9.—**J**ornaleros, 4; juez de instrucción, 1.—**L**abradores y agricultores, 3.—**M**aestros, 52; marmolistas, 3; mecánicos, 15; médicos civiles, 12; médicos militares, 2; militares en activo y retirados, 25; músicos, 3.—**N**iquelador, 1.—**P**anaderos, 2; periodistas, 2; peritos electricistas, 2; personal de Aduanas, 2; ídem de la Armada, 9; ídem de Correos, 5; ídem de Telégrafos, 5; pesador, 1; pintores, 4; pintores escenógrafos, 2; planchadora, 1; policías y del Cuerpo de Seguridad, 6; practicantes, 2; profesores, peritos mercantiles y contables, 5; propietarios, 2.—**S**acerdotes, 5; sastres, 5; secretarios municipales, 3; sobrestante de Obras Públicas, 1.—**T**intorero, 1; tipógrafos, 3; torneros, 7.—**Y**esero adornista, 1.—Sin anotar sus profesiones (grupos esperantistas, etc.), 204.—Total, 740.

## INTERNACIAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

### TIU DE ROMO

La XXVII^a Kongreso estis sukcesa laŭ la nombro de la ĉeestantoj (proksimume 1.500, el 35 landoj); ankaŭ je la vidpunkto turista: ne povis esti alie en Italujo. Ni deziras kaj esperas ke tiu-ĉi sukceso antaŭenpuŝos nian aferon en Italujo.

Tamen, ne ĉiuj kongresanoj estas kontentigitaj. Iuj estas malbone impresataj pro ŝajne malfavora medio; certe ke en nuna Eŭropo mankas ofte tiu «sankta amo», kiu devas dissaltigi «la obstinajn barojn», kiuj dividas la popolojn, sed niaj italaj samideanoj je penos por ke la interna ideo de esperantismo igu el la homoj unu familion, kia ajn estu ilia *haŭtkoloro* aŭ la *mondparto* de ilia naskiĝo.

Aliaj samideanoj opinias ke estis tro da ekskursoj kun malprofito por la kunsidoj. La organizontoj de la venontaj kongresoj cendube atentos tiun observon.

La Kongreso de 1936ª okazas en Vieno. Por tiu de 1937ª estas du petoj: tiu de H. E. A., por Hispanujo; tiu de la polaj samideanoj por Varsovio.

## TIU DE VIENO

La XXVIIª ĵus finis kaj la organizo de la XXVIIIª jam komencis.

La julia numero de *Aŭstria Esperantisto* estas vere eksterordinara. Ĝi enhavas balajn vidaĵojn de Aŭstrujo kaj portretojn kaj favorajn opiniojn pri Esperanto *en esperanto* de iaj membroj de la Honora Komitato por la XXVIIIª nome: ministro por Eksteraj Aferoj barono Egon Berger-Waldenegg (aŭtografe); princino Fanny Starhemberg, delegitino ĉe la Ligo de Nacioj (ankaŭ aŭtografe); ministro por Komerco kaj Trafiko Fritz Stockinger; ŝtatsekretario por Instruado d-ro Hans Pernter; kaj urbestro de Vieno, ekskanceliero Richard Schmidt (aŭtografe). Ankaŭ germanlingve tiun de la Federacia Kanceliero, d-ro Kurt von Schuschnigg.

Jen resumo de la provizora programo:

Sabaton, 8-an de aŭgusto je la 20ª: solena malfermo en ĉiu festsalonegoj de la imperiestra kastelo, kun ĉeesto de la Protektoro, de la membroj de Honora Komitato kaj la granda publiko de eminentuloj; dissendado per radio; tuje interkonatiĝa vespero.

Laborkunsidoj: de la Kongreso, la 11-an en festsalonego Hofburg; ferma kunsido, la 15-an (sabaton) je la 9 h. 30, en Hofburg.—De Esperantista Akademio, la 11-an.—De Komitato de U. E. A., la 11-an.—Fakaj, la 11-an, 12-an kaj 14-an.—De la Somera Universitato sub la titolo de «Kulturaj kaj Ekonomiaj Problemoj de Mezeŭropo», la 10-an kaj 12-an en Hofburg.—Konferenco de la Virinoj, la 12-an en Hofburg.

Iaj numeroj de la programo: La 9-an (dimanĉon) matene, diservoj kun esperantaj predikoj katolika (en preĝejo Sankta Karlo), protestanta kaj izraelida. Vespere, prezentado en Volksoper de la opereto *La blanka ĉevaleto*.—La 11-an, akcepto en la urbodomo, flanke de la urbestro, kaj fotografado antaŭ la urbodomo.—La 12-an, inaŭguro de Esperanto-strato.—La 11-an kaj la 14-an, vizito de trezorejo Hofburg aŭ de la imperiestra ĉambraro.—La 14-an, kostumbalo sub la devizo *La kongreso dancas* en ĉiuj festsalonegoj de Imperiestra Kastelo kun pluraj muzikistaroj; en aparta salonego, viena popolkantista kvarteto por la nedancemaj samideanoj.

*Ekskursoj.*—Antaŭ la kongreso: la 5-an, kunveno en Salzburgo (la naskiĝurbo de Mozart), speciale konvena por kongresanoj el Portugalujo, Hispanujo, Francujo, k. c. Kunvenontoj ekskursos la 6-an kaj 7-an, kaj la 8-an per aŭtobusoj vizitos la abatejon de Melk kaj alvenos al Vieno je la 17ª.

Dum la kongreso: la 9-an per aŭtobusoj: (A) al iama imperiestra plezurkastelo Schönbrunn, kies bestĝardeno estas la plej malnova en Eŭropo. (B) aŭ al apuda urbo Klosterneuburg. (C) aŭ al monteto Kahlenberg.—La 10-an, la samaj. Oni rekomendas al alkoholkontraŭuloj la 9-an en (A) kaj la 10-an en (B) anstataŭ (C).—La 11-an, veturado per aparta ŝipo sur Danubo kun muziko kaj dancado, aŭ veturado al amuzejo Prater.—La 12-an kaj la 14-an, rondveturado al Vieno per aŭtobusoj.—La 13-an, per aŭtobuso kaj kablo-fervojo al Rax-alpo (2.000 mj. ĉe la supro) kaj al Semmering; per trajno kaj dentrada fervojo al Puchberg kaj al Elizabeth-kapelo; per aŭtobusoj al urbo Mödling kaj al kuracloko Baden; per fervojo al abatejo Melk sur alta roko ĉe l' Danubo; per aŭtobusoj al Eisenstadt, kie kuŝas la tombo de la komponisto Haydn.

Post la kongreso.—De la 15-an ĝis la 18-an. Per aŭtobusoj al urbo Mödling, kuracloko Baden, Semmering, urbo Graz (la ĝardena ĉefurbo de la «Verda Stirio»), la regiono Karintia, la valo de la rivero Drau, Tirol kun altecoj de pli ol 2.300 metroj, ĝis Salzburgo.

Kongreskotizo, 48 aŭstraj ŝilingoj (proksimume 68 pesetoj); por familiano de kongresano, 30; por gejunuloj ankoraŭ ne-18-jaraj, 20; por helpkongresano (asocioj, grupoj, firmoj, k. c.), 20. Rabato por frupagontoj ĝis la 31ª de januaro, 30 %; ĝis la 30ª de aprilo, 20 %; ĝis la 30ª de junio, 10 %.

## ESPERANTO, SUKCESIGA LINGVO

Ĉiuj sciencistoj, kiuj studis la efikon de la sugesto, asertas ke penso estas forto kaj ke per sugestado ni povas plibonigi nian vivon kaj nian farton, pensante nur pri gajaj sanigaj ideoj. Ili aldonas, ke por tio oni devas elekti zorge la vortojn; ekzemple, por forigi kapdoloron oni ne diru: «la kapo jam *ne doloras* min» aŭ «iom post iom la *kapdoloro* malaperas», sed «mia kapo pli kaj pli bonfartas». Ĉar unuamaniere ni konservas en nia penso la ideon pri doloro, kaj duamaniere ne, kaj la sugesto estas efika.

Konstante ni sugestas al ni diversajn ideojn, kiam ni parolas aŭ pensas pri niaj aferoj. Sed notu ke se ni parolas esperante la sugestoj estas pli bonaj ol se ni parolas nacilingve dank' al konstruado de Esperanto.

En Esperanto estas vortoj por esprimi ideojn, kiujn mi nomos pozitivaj, kiel *amo, agrabla, afabla, bona, bela, feliĉa, gaja, ĝoji, sukcesi, venki, libera, sana, varmo, lumo, hela, klara, utila, riĉa, virto*, k. t. p., sed vortoj por la kontraŭaj ideoj aŭ tute ne ekzistas aŭ oni povas eviti ilin dank' al la prefikso *mal*. Se oni diras «malfeliĉo» aŭ «malĝojo» oni ankaŭ efikas sukcese, ĉar la ideo pri *feliĉo* kaj pri *ĝojo* estas en tiuj vortoj, kvankam kaŝe.

Certe ke ekzistas vortoj kiel *milito, krimulo, mensogo*, k. a., negativaj, sed estas kontraŭsencaj radikvortoj por ili ĉiuj. Male, por pozitivaj vortoj, kiel multaj el la cititaj pli supre, ne ekzistas en nia lingvo la respondaj negativaj.

Ankaŭ tial mi kredas nekonsilinda la uzon de vortoj kiel *trista* (anstataŭ *malgaja*), *amara* (anstataŭ *maldolĉa*), k. c. Uzu ni ĉiam la vortojn pozitivajn kaj ni sugestos, nin pri sukceso, kaj plenigos la medion je ideoj de virto, de bono, k. c., kaj ni plibeligos la vivon.

Uzu ni ĉiumomente nian lingvon eĉ por paroli kun ni mem, kiam ni pensas pri niaj okupoj, kaj ni venkos en niaj privataj aferoj, ĉar Esperanto estas sukcesiga lingvo; ĝi enhavas la semon de la triumfo; avantaĝo ne enhavata de la lingvoj naciaj. Kaj se ĝi povas sukcesigi, ĉu iu dubos pri la fina sukceso de Esperanto mem?

F. REDONDO

## ESPERANTO VENKOS, SED PER LA LERNEJO
### (ALVOKO AL LA INSTRUISTOJ)

Ĉiuj vi, kiuj estas komisiitaj por formi la junajn animojn de la infanoj al vi fidataj; vi, kiuj per la ekzemplo kaj la parolo povas kaj devas instrui la amon al proksimulo, vi scias ke Esperanto estas pacema armilo, kiu tre faciligos vian taskon, se vi scias utiligi ĝin.

Malmultaj el vi ne estas aŭdintaj paroli pri tiu mirinda helplingvo, interkomprenigilo por la popoloj, kiu permesas la interŝanĝo de ideoj ĉe la homoj de kiaj ajn nacioj.

Estas necese instrui tiun lingvon en la lernejoj de la tuta mondo; enkonduki ĝian lernadon en la lernejaj programoj samtempe ke tiu de la nacia lingvo kaj antaŭ ol aliaj idiomoj.

Sed por tio estas necese ke la instruistaro direktu al tio sian volon, ke ĉiu eklernu Esperanton, se tiun li aŭ ŝi ankoraŭ ne faris.

En Francujo kaj en la tuta mondo jam estas multaj instruistoj esperantistaj; estas necese ke ilia nombro pligrandiĝu kaj ke ĉiu en sia medio, en sia loko, klopodu por interesigi al siaj lernantoj (komence al la plej inteligentaj) la studon de Esperanto. Ili vidos plezure la

tri fingroj kaj osta elkreskaĵo sur la kapo, *kasuaro* (*kasuario*, laŭ Verax). Genroj de kasuarioj, *dromaĝo*, *emuo*. K. el Nov. Zelando, preskaŭ senigita de plumoj, *apteriko*.

*arkeopteriko*, inter reptilio kaj birdo; *dinornito* (vidu paĝon 79ª, linion 15ª m).

## XVIII. — MAMBESTOJ

### Klasifiko de mambestoj.

| | | | | | | Ordoj |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Sen placento. (Nur de Aŭstralio kaj apudaj insuloj) | kun buŝo simila al beko... | | | | | *monotremoj.* |
| Sen placento. (Nur de Aŭstralio kaj apudaj insuloj) | kun ventra poŝo por porti la idojn ........ | | | | | *marsupialoj.* |
| Kun placento | Sen incizivaj dentoj........ | | | | | *sendentuloj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | vivantaj sur la maro ...... | sen piedoj........ | | | *cetacoj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | vivantaj sur la maro ...... | kun rudimentaj piedoj......... | | | *fokoj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | flugantaj ........ | | | | *keiropteroj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | hufuloj (herbomanĝaj). | nepara nombro da fingroj en ĉiu piedo............ | | *unuhufuloj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | hufuloj (herbomanĝaj). | para nombro | kun unu stomako | *pakidermoj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | hufuloj (herbomanĝaj). | para nombro | kun kvar........ | *remaĉuloj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | rostruloj (herbomanĝaj)...... | | | *rostruloj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | la dentoj kreskas al ili...... | | | *roduloj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | sin nutras per........ | insektoj ........... | | *insektivoroj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | sin nutras per........ | mambestoj ....... | | *sovaĝbestoj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | ili havas manojn kaj senharan vizaĝon.... | | | *simioj.* |
| Kun placento | Kun incizivoj | marŝantaj sur la tero | ili parolkapablas........ | | | *homoj.* |

**Monotremoj.** — Akva m. palmopieda, *ornitorinko*. Dentskrapema surtera m. kies haŭto estas kovrita de longaj pinglegoj, simila al histriko, *ekidno*.

**Marsupialoj** (aŭ *didelfoj*).—M. kies antaŭaj piedoj estas tre

mallongaj, *makropo* (vulgara nomo, *kanguruo*). Grimpa makropo, *dendrolago*.

**Sendentuloj.**—La dentoj de s. havas saman radikon. S. de la Sudameriko sin nutranta per formikoj, *mirmekofago*. S. sen ia speco de dentoj, kaj kies korpo estas kovrita de skvamoj tegole aranĝitaj, *maniso*. S. kies dorso estas kovrita de skvamoza karapaco, *dazipo*. Ia s. similanta grandan dazipon, *priodonto*. S. kiu sin movas malrapide kaj emas esti sur arboj, *bradipo*; speco de bradipo, *akeo*. Ia s., *orikteropo*. Gigantaj s-j. el la kvaternara epoko: tiel granda kiel rinocero, *gliptodonto*; similanta bradipon, tiel granda kiel elefanto, *megaterio*.

**Cetacoj** (*ketacoj*, laŭ Verax). — Ia genro de c., vivanta en glaciaj maroj, *balenoptero*; specoj, *baleno* (la plejgranda), *gibaro*, *jubarto*, *rorkvalo* (kiun foje oni vidas en varmetaj maroj). Elastaj organoj, kiuj provizas la internon de la buŝo de balenoptero, *barto* aŭ *balendento* aŭ *balenosto*. C. el varmetaj maroj, kun dentoj nur en la malsupera mandiblo, el kies kranio oni ekstraktas ian blankan grasan substancon (*spermaceto*), kaj el kies intesto, grizan tre odoran substancon uzatan de parfumistoj (*ambro*), *makrocefalo* aŭ *kaĉaloto* (*kaŝaloto*, laŭ Kabe). C. el varmetaj kaj varmaj maroj, longa ĝis tri metroj kun centoj da dentoj, *delfeno*. Delfeno persekutanta la salmojn, *foceno*. Delfeno kun longa dento (du aŭ tri metroj) ĉe la supra makzelo, *narvalo*. Iaj c-j., *kalikoro*, *manato* aŭ *marbovino* (herbomanĝa), *riteno*.

**Fokoj.**—Ili estas kovritaj de haro. F. kun du longaj elstarantaj dentoj, *rosmaro*.

**Keiropteroj.**—K. krepuska, similanta flugilhavan muson, *vesperto*. Specoj de vesperto, *barbastelo*, *mureno* (ofta en Franclando), *noktolo* (granda), *pipistrelo* (ofta en la urboj), *plekoto* (kun 25 cmj da enverguro), *pteropo* (duberuĝa, el Filipina Insularo, kun pli ol unu metro da enverguro). K. kies ventro estas provizita de larĝa membrano, kiu ebligas ĝian flugon kvazaŭ aeroplano, *galeopiteko*. K. el Ameriko kun preskaŭ duonmetro da enverguro, *desmodo*. Fosilia reptilio, kiu similas al k., *pterodaktilo*.

**Unuhufuloj.**—U. kies nazo havas mallongan rostron, *tapiro*. Malaperinta u. simila je tapiro, *paleoterio*. U. kun kolhararo, kaj servanta kiel rajdbesto kaj jungobesto, *ĉevalo*. Afrika ĉevaloido kun nigraj kaj blankaj aŭ flavaj strioj, *zebro*. Longorela ĉevaloido, *azeno*. Ido de azeno kaj ĉevalino, *mulo*. Speco de sovaĝa azeno (transiro de azeno al ĉevalo) vivanta en Okcidenta Azio, *hemiono*. Ĉevalo dubeflav-

ruĝa, kies koloro varias de paleco ĝis malpaleco kun haroj samkoloraj, *alzana*. Ĉevalo kun blankaj postaj piedoj kaj blanka punkto sur la frunto, *arzela*. Mambesto dikhaŭta havanta unu aŭ du kornoj sur la nazo, *rinocero* aŭ *nazkornulo*. (Ĝi ne estas unuhufa, sed trihufa).

**Pakidermoj.**—Greke p. signifas *dikhaŭtulo*. P. malgranda kiel kuniklo, *hirako*. Hejma duhufa p., kies viando estas manĝebla en kolbasoj, ŝinkoj, k. c., *porko*. Sovaĝa porko, *apro*; amerika apro, *dikotelo*; afrika apro kun kvar dentegoj, *fakoĉero*; ia hinda porko, *babiruso*. Granda p. afrika vivanta en riveroj kaj lagoj, *hipopotamo*, aŭ «rivera ĉevalo».

**Remaĉuloj.**—Ili revenigas en la buŝon la englutitan nutraĵon por ĝin re'maĉi kaj ree engluti. Duhufulo kun grandaj belaj kornoj, *cervo*. Iaj cervoidoj: kun larĝaj plataj kornoj, *alko*; kun palmoforma kornaro kaj makulpunktita haŭto, *damao*; el malnova kontinento, je la alteco de kapro, *kapreolo*; el Meza Azio, simila je kapreolo kaj sekrecianta aroman substancon (kiu estas nomata *mosko*) el surventra glando, *mosko*. Cervosimila r. vivanta en la nordaj regionoj, *rangifero*. Iaj cervoidoj, *aksiso*, *cervolo*. Hejma duhufulo edukata por lano, lakto kaj viando, *ŝafo*; hispana ŝafo kun tre delikata lano, *merinoso*; sovaĝa ŝafo kun dikaj kaj kurbaj kornoj, *tragelafo*. Duhufulo kun malgranda barbo, *kapro*. Rapidkura r. kun rondaj kornoj, *antilopo*. Specoj de antilopo: kaprosimla, eŭropa, kiu vivas en altaj montoj, kaj el kies haŭto oni faras delikatan felon, *ĉamo*; el Nord-Afriko kaj Arabujo, *gazelo*; el Sud-Afriko, *gnuo*. Hejma r. uzata kiel jungbruto kaj kies ino liveras lakton, *bovo*; nekastrita bovo, *taŭro*. Specoj de bovo: plejgranda eŭropa mambesto, *uro*; sovaĝa, el Nord-Ameriko, *ovibo*; granda senhara, el malnova kontinento, *bufalo*; granda, el Filipina Insularo, *bubalo*; kun longaj haroj sur la kapo, el Kaŭkazo kaj Ameriko, *bizono*; el Hindujo, kun ĝibo, *zebuo* aŭ *zebubovo*. R. kun longa kurba kolo kaj unu ĝibo, *dromedaro*, aŭ du ĝiboj, *kamelo*. R. kun longa rekta kolo, *lamo*. Sudamerika speco de lamo, *alpako*. Amerika r. similanta lamon, kun delikata lano, *vikuno*. Duhufa r. kun longa rekta kolo kaj la antaŭaj piedoj pli longaj ol la postaj, *ĝirafo*.

**Rostruloj.**—Plejgranda dikhaŭta r., kun longa movebla nazego kun fingroforma ekstremo, *elefanto*. Eŭropa grandega elefanto de la diluva etaĝo, *mamuto*; amerika mamuto, *mastodonto*. Ia malaperinta r., *dinoterio* (*dinoteriumo*, laŭ Verax).

**Roduloj.**—Ili *rodas*, tio estas, movas poste antaŭen kaj reciproke la malsuperan mandiblon por maĉi. Manĝebla longorela r. kun fendiĝo ĉe la supera lipo kaj la postaj kruroj pli grandaj ol la antaŭaj, *leporo*. R. simila je leporo, sed pli malgranda, la oreloj proporcie pli mallongaj kaj la kruroj pli egalaj, *kuniklo*. Malgranda r. el Sud-Ameriko kun malgranda aŭ nenia vosto, kaj utiligata por medicinaj eksperimentoj, *kobajo*. Manĝebla hejma r. el Ameriko, simila je kuniklo, *agutio*. Siberia r. najbara de la leporo, *lagomiso*. R. kun lipharoj, kaj kies haŭto estas kovrita je longaj pingloj, *histriko*. R. kun longa vosto, grandaj oreloj kaj okuloj, kaj pinta vizaĝo, *muso*. Iaj musoidoj, *dipo* (el Afriko kaj Persujo), *helamiso*, *hamstro* (kampa), *miogalo*, *rato* (granda, portisto de iaj epidemioj), *kapromiso*. R. kun dika kapo similanta rateton, *arvikolo*. Migranta r. el Norvegujo, similanta grandan raton, *lemingo*. Malgranda r. el Sud-Ameriko, najbara de rato, *abrokomo*. Musoido kun vosto pli longa ol la korpo, blankaventra kaj loĝanta en la dezertoj de Arabujo kaj Sirujo, *dipo* aŭ *gerbilo* (*gerbelo*, laŭ Verax). R. kun larĝa vosto kovrita de skvamoj, kaj kun belaj peltoj vivanta en societoj kaj konstruanta loĝejojn, *kastoro*. Ruĝbruma roduleto kun haroriĉa vosto, *sciuro*. Roduleto havanta inter la kruroj membranon per kiu ĝi kvazaŭflugas de arbo al arbo, *sciuroptero*. R. el la vico de la sciuro, *arktomiso* aŭ *marmoto* (ĝi vintredormas). R. similanta arktomison, *spermofilo*. Speco de spermofilo, loĝante en Bohemujo kaj Finlando, *zizelo*. Aliaj roduletoj, *gliro* (multedormanta), *kavio* (el Sud-Ameriko).

**Insektivoroj.**—Ili estas *planduloj* aŭ *plandmarŝuloj*, tial ke dum la marŝado metas sur la tero la tutan plandon. I. sen lipharoj, kaj kies haŭto estas kovrita de pingloj, *erinaco*. I., plej malgranda mambesto, *soriko*. I. malgranda kun velursimila pelto kaj konstruanta subterajn galeriojn, *talpo*. Fosulo similanta talpon, kies naztruoj estas ĉirkaŭitaj de moveblaj kartigalecaj punktoj, kiuj dum ŝvelo similas stelon, *kondiluro*.

**Sovaĝbestoj.** — La *ursoidoj* estas kvinfingraj planduloj. Iaj specoj, *genoto* (granda, kun bela pelto), *urso* (granda, ĉefa speco), *procio* (granda kiel vulpo, simila al urseto), *nazuo* (el Sud-Ameriko), *cerkolepto* (el Ameriko, simila al urseto).

La *musteloidoj* havas flekseblan longigitan korpon, kaj estas la plej malgrandaj sovaĝbestoj. Ĉefaj specoj, *civeto* aŭ *cibetkato* (el Afriko kaj Sud-Azio, kun bela delikata pelto, kaj produktanta el glando bonodoran substancon nomatan *cibeton*), *ermeno* (blanka, kun multvalora pelto), *foino* aŭ *mustelmuso* (griza supre kaj dubeflava malsupre; ĝi

rapidajn progresojn de siaj lernantoj, kaj baldaŭ notos ke la ceteraj estas altiritaj al tiu simpla kaj facila studo. Plie, ili konstatos mirigitaj ke la kelkaj horoj ĉiusemajnaj dediĉitaj al Esperanto ne estas perditaj, ĉar la infanoj, stimulataj de la studo de lingvo komprenata en la tuta mondo, anstataŭ malzorgi siajn devojn por la nacia lingvo, ili laboros elkore kaj plivarme.

Jam en kelkaj landoj tiuj pruvoj donis surprizaj rezultatoj, surpasante ĉiujn esperojn.

... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ... ...

Tiam, dank' al Esperanto oni starigos ĉe la infanoj de la tuta mondo rilatojn de internacia amikeco. Tiuj infanoj, kiam ili viriĝos, faros la union de la estontaj idaroj, kiuj asekuros la Universalan Pacon.

Kiom da vi, edukistoj de la junularo, volas atenti tiun konsilon?...

Se ĉiu instruisto esperantista lernigus ĉiujare nur kvin aŭ ses en la supera klaso de la unuagrada lernejo, post malmulta tempo la esperantista movado penetrus ĉie kaj la disĉiploj de Zamenhof trovus en la tuta mondo novajn kaj verajn amikojn.

(El «Le Phare de l'Espéranto»).

Trad. el franca lingvo: F. R.

## —o— SONATO —o—

La princino malgajas... Kion sentas princino?
sopiraroj forkuras el la buŝ' de feino,
ĉar ŝi perdis la ridon, ĉar foriĝis kolor'.
La princin' sidas pala sur la seĝ' sia ora,
la klavar' estas muta de l' piano sonora,
kaj en glas' forgesite dolĉe svenas rozflor'.
En ĝardenon la triumf' de la pavoj sin tiras,
dommastrin' babileme banalaĵojn eldiras,
kaj ridigas tutruĝan histrionon je si.
La princino ne ridas, ŝi fariĝis sensenta,
la princin' persekutas tra ĉiel' orienta
konfuzigan libelon de konfuz-iluzi'.
Ĉu ŝi revas je l' princ' el ekstrem' orienta,
pri nobelo veninta per kaleŝ' arĝenta,
por vidadi lumdolĉon de l' okuloj de ŝi?
Aŭ pri reĝ' de l' insuloj de rozar' aromanta,
aŭ pri l' estro fiera de l' ŝton' diamanta,
aŭ pri l' mastro de l' perloj Ormuz' idoldi'?

Ha !, princin' malfeliĉa kun la buŝu lilia
volas esti hirundo, esti majpapilia,
forflugadi rapide sub tutblu-ĉielar' ;
iri sunon laŭ skalo de ardfulmaj ŝiraĵoj,
salutadi liliojn per la majaj versaĵoj
aŭ perdiĝi en la vento super tondro de l' mar'.
Ne plu volas palacon, nek ŝpinilon amatan,
nek balkonon sorĉitan, nek ludiston skarlatan,
nek la cignojn neĝblankajn sur la lag' en blunud'.
Kaj malgajas la floroj pro la flor' de l' reĝejo ;
la jasmen' orienta, la levkoj' de l' nordejo,
okcidentaj dalioj kaj la rozoj de l' Sud'.
Malfeliĉa princino kun la bluaj okuloj !
Kaptis ŝin la oraĵoj, kaptis ŝiaj ŝin tuloj
en la kaĝon marmoran de la reĝa palac' ;
la palaco pompega, ĉirkaŭita de gardoj,
kiuj viglas cent negroj kun la cent halebardoj,
leporhund' nedormema kaj de draka minac'.
Ho, virin' Hipsipil' !—krias buŝ' malbenata—
(La princino malgajas. La princin' estas pala).
Ho, revata vizi' el or', arĝent' kaj ebur' !
Kiu flugus en landon, kie princ' ĝoje majas
(La princin' estas pala. La princino malgajas)
ol la sun' pli brilanta, bela pli ol lazur' !
Ha, silentu ! Silentu !—baptfeino ŝin diras—
sur ĉeval' kun flugiloj tien ĉi rapidiras,
kun la glav' kaj ĉasbirdo tien ĉi venas jam
kavaliro feliĉa vin amanta kun forto,
el nubej' alvenante post venkado de l' Morto
viajn lipojn ardigi per brulkis' el junam' !

*Hispane verkis:* RUBÉN DARÍO +
*Tradukis esperante:* C. CALLEJA

## XI^a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

Jam estas decidite ke ĝi okazu en Barcelono dum la venonta printempo.

Kotizo, 5 pesetoj ; aliĝo de grupoj, 10 pesetoj.

Sur la venonta numero ni sciigos pluajn detalojn (premioj por frupagantoj, k. c.).

## —o— LA URTIKO —o—

En Hispanio, bedaŭrinde, oni ne atentas la urtikon, oni ne kulturas ĉi tiun utilan planton, kies graveco de diversaj vidpunktoj estas rimarkinda. Ĝi estas bongustega nutraĵo por la homo, kiam ĝi estas juna, same kiel aliaj multaj plantoj. La loĝantoj de Kamschatka fabrikas el ĝiaj ŝpinitaj fibroj la retojn por la fiŝkaptado; en Francujo, oni uzas ĝin por fabriki paperon; en Rusujo, Svedujo kaj Nederlando, la urtiko estas uzata por nutri la brutaron, kaj oni asertas, ke tiu ĉi nutraĵo liberigas la bestojn el infektaj malsanoj; la ĉinoj kaj la judoj utiligas urtikan fadenon por teksi blankan drapon tre bonan. Por la teksindustrio la urtiko de Ĉinio estas la plej bona, ĉar la teksaĵoj el ĉi tiu urtiko estas sufiĉe delikataj, kvazaŭ el silko. En nia lando, ĉie la urtiko vivas kaj kreskas spontanee, kaj niaj terkulturistoj devas interesiĝi pri ĝia kulturo.

## —o— BIBLIOGRAFIO —o—

*Dudeksesa Universala Kongreso de Esperanto*. Eldono de U. E. A. Formato 21 × 14'5. 156 paĝoj.—Ĝi enhavas la protokolon, financan raporton kaj statistikojn de la kongreso; raporton de U. E. A. pri 1933-34 kun kelkaj aldonoj, kaj raportoj kaj kalkuloj de la Esperantista Lingva Komitato kaj Akademio. La verko estas kompleta dokumentaro ne nur pri la 26ª Kongreso, sed pri la agado de U. E. A. dum la lasta jaro. Ni notas ke en la listo de salutoj al la XXVIª oni ne mencias la telegramon de la Milita Ministro de la Hispana Respubliko, kies tekston publikigis HISPANA ESPERANTO-GAZETO sur la numero 41ª, paĝo 10ª.

*Ok semajnoj en la lando de la granda plano*, de A. Schwartz. Raporto de l' delegitaro sendita de Berlina proleta esperantistaro al U. S. S. R. 64-paĝa broŝuro, 17 × 13-formata, kun bildoj.—Ĝi enhavs interesajn scenojn kaj priskribojn pri la nuna Rusujo, kies progreson ĝi celas pruvi. Eldonejo: Ukrainia Naciminorita. Harkovo. Kievo.

*Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio*.—40-paĝa, 15'5 × 12, prezo 2 fr. fr. Mendebla al Esperantista Centra Librejo (11, rue de Sèvres, Paris VI).—Rekomendinta broŝuro pro sia interesa enhavo al ĉiuj esperantistaj grupoj kaj al propagandistoj.

*BES-adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj*.—Ĵus aperis la 12-a eldono kun 1.154 adresoj de esperantistoj de pli ol 40 landoj. Okdek portretoj. Formato 11 × 14'5. Prezo 1 sv. fr.—Por hea'anoj havas specialan intereson, ĉar ĝi enhavas la adresojn de preskaŭ sepcent

membroj de nia Asocio. Kun la septembra numero de HISPANA ESPERANTO-GAZETO ni sendis la ekzempleron al tiuj hea'anoj, kiuj estis mendintaj ĝin. Ni povas ankoraŭ liveri iajn ekzemplerojn po 1,75 pesetoj, plus la sendkosto por tiuj, kiuj ne estas membroj.

*Enciklopedio de Esperanto, IIa volumo.*—Formato 23'5 × 15'5. Ĝi enhavas 600 tekstopaĝojn kaj aparte 761 bildojn (portretojn, faksimilon de la manskribo de nia Majstro kaj de iaj gravaj esperantistoj, vidaĵojn de kongresurboj, bildojn pri ĉiuspecaj esperantaĵoj kiel gazetoj, glumarkoj, k. c.). La dua volumo estas tiel valora kiel la unua. Tiu ĉefverko devas nepre esti en ĉiuj bibliotekoj. Prezo de la du volumoj kune 30 sv. fr. (aŭ 34 bindita) plus 10 % por sendkosto. Mendebla al «Literatura Mondo». Mester, u, 53-5-5. Budapest.

*Sango kaj sablo.*—22 × 16. 232 paĝoj. 8,50 pesetoj por Hispanlando, sendkosto enkalkulata. Ĝi estas bona traduko de la fama romano de Vicente Blasco Ibáñez farita de nia samideano Ramón de Salas (prezidanto de «Frateco», strato Roda, 14 kaj 16, Zaragoza), kiu lerte venkis la malfacilaĵojn de la traduko de iaj frazoj tro regionaj. Estas konvenaj la novaj vortoj (kies signifon oni klarigas ĉe la fino de la verko) por traduki iajn esprimojn, kaj oportuna la antaŭparolo. Certe ne ĉiuj hispanoj estas taŭremuloj nek ĉiuj taŭremuloj estas hispanoj. Blasco Ibáñez mem montrante la kruelecon de la publiko, kiu altrudas al homoj sin ĵeti en danĝeron kaj postulas la oferon de la ĉevaloj, kondamnas la tielnomitan feston per la lasta frazo de la verko: «Jen kiel la vera, la nura rabbesto raŭke blekas.»

Eble iaj vortoj ne estas trafe tradukitaj: *liberpensano* (paĝo 153a) anstataŭ *liberpensulo*; *tenorulo* (p. 117a a. *tenoro*); *novula* (p. 195a), k. c. La titolo mem *Sango kaj sablo* estus plibone *Sango kaj areno*. Sed, kiel diris Cervantes, «haŭtmakuleto sur bela vizaĝo plibeligas ĝin». Bona papero. Arta librofasado. Jen havinda verko.

*Estenografía española (primer grado).*—Verkita de nia samideano Rodrigo Almada (profesor normal, Independencia, 5, Alicante). Ĝi instruas stenografion laŭ la sistemo de F. de Kunovski. Prezo, 1,50 pesetoj. Formato 15 × 22. Tiu interesa broŝuro enhavas en siaj 24 paĝoj dekdu lecionojn kaj ekzercaron per kiuj dum malmulte da tempo oni povas lerni stenografion laŭ la sistemo de F. de Kunovski. Baldaŭ aperos la broŝuroj por la dua kaj tria grado.

—Ĉu vi havas fidon pri la specialaj kuraciloj?
—Grandan; mia frato multe gajnis per ili.
—Kian li uzis prefere?
—Li estas apotekisto.

## La vero venas al ni pere de la infanoj

Infanoj ludas je milito. La *generalestro* asignas al ĉiu lian rolon.
Ci, ci restos en la tranĉeo.
Ci, ci estos la gardostaranto.
Ci, ci estos la malamiko.
Sed malgranda knabo ankaŭ volas ludi; la *generalestro* juĝis lin «netaŭga por la armeoj», tamen ĉiu devas ludi.
Ci, ci estos tiu, kiu decidas la militon... (1) do, ci ne batalos!

(El «Le Phare de l' Espéranto», de Villa Zamenhof, Sisteron, B. A., Francujo).

---

(1) Hispane: *el que declara la guerra.*

## ENLANDA KRONIKO

*Cartagena.* — Niaj agemaj samideanoj S-roj Oliván kaj Lerroux daŭrigas la propagandon per interesaj artikoloj pri la XXVII^a^ Kongreso, la deveno de Esperanto, k. c., sur *El Noticiero*, grava ĵurnalo de tiu urbo. Sur la numero de la 8^a^ de majo de la dirita ĵurnalo ni legas ke la Urba Konsilantaro, laŭ peto de S-ro Oliván, delegito de U. E. A., knosentis monhelpon por la XXVII^a^ Kongreso de Romo.

* * *

*Barcelono.*—Nia estimata kunheaano S-ro Francisko Vilá, je la lastaj tagoj de pasinta septembro, finis la klarigon de Esperanto-kurso ĉe ESCOLES PARROQUIALS en Clot-kvartalo, kun memorinda sukceso.

La unua premio dum la ekzamenoj el tiu kurso estis gajnata de inteligenta kaj deksesjara fraŭlino, Herminio Borrás Mora. Nian koran gratulon al ŝi.

S-ro Francisko Gorgues el Komitato de Zamenhof Instituto, prezidis tiujn ekzamenojn.

## EKSTERLANDA KRONIKO

*Germanujo.*—Dekreto de la Regna kaj Prusa Ministro por Scienco, Eduko kaj Popola Klerigo malpermesas instruon de Esperanto en oficialaj lernejoj konsiderante ke «uzo de arte kreitaj mondhelplingvoj, kiel Esperanto, kaŭzas malfortigadon de esencaj valoraĵoj de popola

karaktereco» kaj ke «ĝi ne havas lokon en la nacisocialista ŝtato». Tamen, tio ne signifas ke Esperanto estas nun malpermesata en Germanujo, kiel iuj gazetoj asertas erare.

* * *

*Hungarujo.*—Simile al aliaj landoj la reĝa hungara poŝto eldonas de pluraj jaroj oficialajn poŝtkartojn kun ilustraĵoj pri la allogaj turismaj lokoj de la lando. Pro la neebleco aperigi kartojn kun klarigoj en ĉiuj lingvoj kutime necesaj kaj uzotaj, la hungara poŝtdirekcio limiĝas al klarigo de la teksto en hungara kaj en franca lingvoj (lingvo de la Universala Poŝt-Unio) kaj en Esperanto por ĉiuj ceteraj lingvaj teritorioj. Ĵus elirinta nova serio de 16 kartoj pruvas la bonajn spertojn faritajn per tia procedo. La poŝtoj de Liĥtenstejno kaj Brazilo aperigis similajn eldonojn kun teksto germana-esperanta kaj portugala-esperanta, respektive. Tiuj eldonoj kontribuis multe al progresigo de la turisma propagando de la koncernaj landoj.

Esperantistoj estas invitataj diskonigi tiun sukceson per la nacia gazetaro kaj sendi po du ekzempleroj kun la koncerna publikigo al S-ro Roberto Kreuz, redaktoro de «Esperanto». 1, Tour de l'Ile, Ĝenevo (Suiza).

Por ŝpari afrankon oni povas sendi nur la titolpaĝon de la koncerna gazeto kaj la artikolon en du ekzempleroj. Notu klare la nomon kaj adreson de la sendinto, kiu tiamaniere povos ricevi, kiel dankosignon, originalan poŝtkarton de la nova serio.

* * *

*Nederlando.*—La granda nederland-lingva semajna gazeto «Haagsche Post» malfermis Esperanto-lingvan rubrikon. kiu en ĉiu numero publikigos aktualajn aritkolojn de Andreo Cseh pri Esperanot kaj la Esperanto-movado. La unua artikolo aperis la 7-an de septembro.

La redakcio de «Haagsche Post» anoncis internacian konkurson por ricevi taŭgan, trafan titolon por la Esperanto-rubriko. La titolo povas esti unu aŭ kelkaj vortoj en Esperanto aŭ en la nederlanda lingvo. La proponoj devas esti sendataj sur poŝtkarto ĝis la 15ª de oktobro 1935 al: *Redakcio de «Haagsche Post», Noordeinde 23, Den Haag. Nederlando.* La plej bona solvo estos premiata per 25 ned. guldenoj.

La fakto, ke la «Haagsche Post» alprenis Esperanton, estas gravega, ĉar ĝi estas unu el la plej disvastigitaj kaj ŝatataj gazetoj, aperanta en grandega eldonnombro kaj legata en la tuta mondo. Tial estas tre rekomendinde, ke multaj Esperantistoj el diversaj landoj

montru sian intereson, partoprenante en la konkurso kaj gratulante al la redakcio. Al interesiĝantoj la redakcio disponigis kvanton de senpagaj specimenaj numeroj.

* * *

*Brazilo.*—La urbestraro de Río de Janeiro organizis «Montron de Turismo» en kiu multaj landoj partoprenis kun belaj standoj. Brazila Ligo Esperantista ankaŭ starigis standon «Esperanton» pro kio ĝi ricevis varmajn gratulojn de pluraj Ambasadoroj kaj Legacioj. Notindaj estas la gratuloj de la Ambasadoroj brita kaj hispana kaj tiuj de la Legacioj de Aŭstrujo, Polujo, Germanujo kaj Finnlando. Hispana Ambasadoro skribis: «...mi tre dankas vin pro la frazoj, kiujn vi diris pri la hispana stando ĉe la Turisma Montro de Río de Janeiro; mi petas akceptu mian gratulon por la stando de Esperanto, per kiu Brazila Ligo Esperantista sin reprezentis ĉe tiu ekspozicio, kaj kiu meritis la unuaniman aplaŭdon de ni ĉiuj, kiuj ĉeestis la inaŭguron de tiu Montro.»

* * *

*Meksikio.*—Sur la aŭgusta numero de la revuo *Renobasion* (kiu celas simpligi hispanan ortografion) ni legas artikolon en esperanto, kaj novaĵojn pri nia movado.

## —o—o— IO EL ĈIO —o—o—

### LABIRINTA FAMILIO

A estas patro de E, kaj B estas patrino de C; A kaj C geedziĝas, ankaŭ B kaj E.

Geedzoj A-C havas filon, I, kiu estas frato de E kaj nepo de lia edzino. B kaj E havas filinon, kiu estas fratino de C kaj nepino de ŝia edzo.

A estas bopatro kaj bofilo de B; kaj B, bopatrino kaj bofilino de A. La frato de E estas lia duonnepo; kaj la fratino de C, ŝia duonnepino. Sekve, E estas kvazaŭ sia propra avo, kaj C kvazaŭ sia propra avino.

Nun, A kaj C havas novan filon, O, kiu asertas ke li ne estas frato de I. Kio estas O?

* * *

## DIVENAĴO

Numeratoro de ia frakcio konsistas el kvar malsamaj ciferoj, kaj estas numero tre konata de la heaanoj.

Denominatoro (kiu estas pli ol sesoblo kaj malpli ol sepoblo de la numeratoro) konsistas el la samaj ciferoj metitaj alimaniere. Se oni turnas la paperon la frakcio estas la sama. Kia estas la frakcio?

Ni avertas al niaj legantoj ke tio *ne estas problemo matematika*, sed *divenaĵo*.

* * *

## SOLVOJ DE L' ANTAŬA NUMERO

*La fiŝoj.*—La gajninto metis fiŝon de la *unua* korbeto en la *kvaran*; tiun de la *kvina* en la *okan*; tiun de la *naŭa* en la *dekduan*; tiun de la *tria* en la *sesan*; tiun de la *sepa* en la *dekan*, kaj tiun de la *dekunua* en la *duan*. Entute tri rondoj.

*Ho sen hoj.* — Horizontale: 1, mil sepdek (ankaŭ mil sesdek aŭ mil cent ok); 2, do; 6, ili; 8, eĉ; 9, ok; 10, teo; 11, do; 12, al; 13, iam; 16, ne; 18, ro; 19, amo; 20, ol; 21, organismo.

Vertikale: 1, modo; 2, eble; 3, kaĉo; 4, okulo; 6, it; 7, io; 8, edeno; 12, arto; 13, ia; 14, amen; 15, mo;, 17, elfo.

* * *

## POŜTA ANGULO

*Novaj poŝtmarkoj hispanaj.*—La 19-an de junio aperis blua p.m. aera je du pesetoj montrante la aŭtoĝiron de La Cierva super Sevilla. Baldaŭ aperos eldono de p.m.j kun la portretoj de D. Alejandro Lerroux, D. José Moya, D. José Francos Rodríguez kaj D. Ignacio Luca de Tena subtenantoj de la Asocio de la Hispana Gazetaro.

Je la honoro de la fama verkisto Lope de Vega aperis la unuan de aŭgusto la jenaj markoj 15-centima, griz-verda; 30-centima, karmina; 50-centima, nigreblua, kaj 1-peseta, ardeza.

*Pri la dekreto de la hispana registaro.*—Sekve de petskribo de H. E. A., kaj per decido de la 31ª de aŭgusto, la Ministro pri Komunikaĵoj konsentas sur la poŝtaĵoj markojn kaj surskribaĵojn de esperanta propagando.

* * *

Fernando Tiago Vicente (Av. de Outubro, n.º 164, 4.º d., Lisboa) deziras korespondi kun juna hispana samideanino.

TIPOGRAFÍA CHULILLA Y ANGEL.—Torrecilla del Leal, 17 - Teléfono 71926